

La Japana Budhano

Bulteno de Japana Budhana Ligo Esperantista
N-ro 382/ 2559 (2016) aŭtuno



Invito al Budhana Esperanto-Movado

Enhavo

1. Kio estas budhismo?	2
2. Vivo de Ŝakja-munio	10
3. El Sutroj	14
4. Budhismo en la mondo	16
5. Esperanto kaj Budhismo	23
6. Budhana Ligo Esperantista (BLE)	25
Aliĝilo	31

1. Kio estas Budhismo?

ĝenerala enkonduko

Budhismo estas unu el la grandaj universalaj religioj.

Ĝi estis iniciatita de Ŝakja-munio en antikva Hindio (Barato) antaŭ ĉ. 2500 jaroj, kaj disvastiĝis ĉefe en suda, sudorienta kaj orienta Azio. Estas malfacile kalkuli ekzaktan nombron de ĝiaj adeptoj, sed laŭ iu statistika raporto ĉ. 500 milionoj da budhanoj estas en la tuta mondo. Nun ne nur en Azio sed ankaŭ en Eŭropo kaj Ameriko troviĝas certa nombro da budhanoj, anoj kiuj iel tiel ŝatas aŭ praktikas la instruon.

En budhismo la plej gravan rolon, la plej altan valoron kaj la plej fundamentan koncepton faras ne dio sed budho. La vorto "budho" (sanskrite kaj palie¹ *buddha*) signifas tiun, kiu vekigis. Tial budho estas vekiginto je vero. Li (aŭ ŝi) ne estas superhoma nek supernatura estaĵo.

Ĉiuj budhanoj samopiniis, ke antaŭ 2500 jaroj Ŝakja-munio, kies denaska nomo estas Gotama Siddatta (palie) aŭ Gautama Siddhartha (sanskrite), post ekzercado multjara vervekiĝis kaj fariĝis budho. Teorie, krom li povas troviĝi budhoj; pri tio tamen diversaj skoloj havas diversajn opiniojn.

En budhismo troviĝas multaj skoloj kaj ili foje havas nesamajn ideojn. Ĉi-sube prezentitaj estas nur gravaj kaj komunaj pensoj.

la tri rifuĝoj

Ĉiuj budhanoj havas komunan sintenon, nome estimon al la tri trezoroj: budho, dharmo kaj sangho. En diversaj kazoj, ne nur en ceremonio sed ankaŭ en ordinara vivo, budhanoj ofte ĉantas jenajn strofojn en sia propra lingvo aŭ en la palia lingvo:

Al la budho rifuĝas mi.

Buddhaṃ saraṇaṃ gacchāmi

Al la dharmo rifuĝas mi.

Dhammaṃ saraṇaṃ gacchāmi

Al la sangho rifuĝas mi.

Saṅghaṃ saraṇaṃ gacchāmi

¹ Sanskrito kaj la palia estas du ĉefaj lingvoj, en kiuj la budhismaj praaĵ tekstoj estas dokumentitaj.

Oni devas noti, ke ĉi tie “rifuĝo”(*saraṇa*) ne nepre signifas kredon. “Kredo” en aliaj religioj ĝenerale premisas ion superhoman aŭ sanktan, de kio kredantoj petas protekton kaj profiton. Ankaŭ en budhismo estas dioj, kaj multaj budhanoj ne ignoras diojn, sed ili nur ludas la rolon de gardanto de budha instruo. Budhismo estas principe ateismo. Sen dio la fundamenta instruo de budhismo tute ne ŝanĝiĝas.

Budho:

Ŝakja-munio estas historie reala budho. Krom li multaj budhanoj supozas pasintajn budhojn kaj futuran budhon. Kelkaj mahajanaj skoloj starigas alimondajn budhojn kaj eĉ abstraktan budhon. Kaŝapo estas unu el la pasintaj budhoj, Majtrejo estas futura, Amitabho estas unu el la alimondaj budhoj. Vajroĉano estas la simbolo de universala vero.

Dharmo:

Sanskrite *dharma*, kaj palie *dhamma*. Dharmo havas multajn signifojn: regulo, leĝo, vero, ekzisto, kutimo, prediko, k.t.p. Etimologie, tenanto de ekzistaĵoj (*dhr* = teni). En multaj hindaj religioj dharmo estis/estas rigardata kiel normo aŭ io simila al dio.

Ŝakja-munio alprenis la koncepton de dharmo kaj donis al ĝi gravan signifon, t.e. universalan veron. Se Ŝakja-munio fariĝis budho vekiĝinte je tiu universala vero, oni povus diri, ke dharmo antaŭstaras Ŝakja-munion. Li mem diris, “Mi retrovis la malnovan vojon, sur kiu pasintaj sanktuloj paŝadis.”

Li ankaŭ testamentis al siaj disĉiploj: “Post mia forpaso, vivu surbaze de vi mem sed ne de aliuloj, vivu surbaze de dharmo sed ne de io alia.”

Oni ofte rigardas dharmon preskaŭ samsignifa al la instruo de budho. Instruoj de la budho Ŝakja-munio estis dum longa tempo transdonitaj de generacio al generacio buŝe, ne skribe. Poste la instruoj estis redaktitaj kaj litere dokumentitaj. Sutro estas la aro de dokumentitaj instruoj. Tial sutro estas lingve esprimita dharmo, sed oni devas atenti, ke dharmo ne povas esti plene esprimebla en frazoj. Nagarĵuna (budhisma filozofo, ĉ.150-250) diris, “Saĝulo volas montri la lunon per fingro. Malsaĝulo vidas lian fingron sed ne la lunon. La fingro montranta la lunon ne estas la luno.” Jen la rilato inter sutro (fingro) kaj dharmo (luno).

Sangho:

Sanskrite kaj palie *sangha*. Origine la vorto signifis komunumon. En budhismo la komunumo de monaĥoj (bikŝuoj) kaj monaĥinoj (bikŝuinoj). Gemonaj estis tiuj praktikantoj de budhismo, kiuj forlasis hejmon kaj la tutan vulgaran vivon kaj observas pli multajn preceptojn ol laikaj budhanoj. Budhanoj rifuĝas ankaŭ al sangho, ĉar ĝi havas la gravan rolon praktiki la budhan instruon, montri al la mondo ĝian verecon, eduki novajn disĉiplojn kaj tiamaniere strebas al la feliĉo de ĉiuj vivestaĵoj.

Laŭ kelkaj skoloj aŭ regionoj sangho inkluzivas ankaŭ laikajn budhanojn, do tiukaze sangho signifas la tutan budhanaron. Sed la rifuĝo estas limigita nur al la komunumo de monaĥoj kaj tiu de monaĥinoj.

La vorto “monaĥino” ne estas simple ina formo de monaĥo. Monaĥinoj observas pli multajn preceptojn ol monaĥoj, kaj ili formas alian sanghon disde monaĥa sangho.

la kvar noblaj veroj

Kiam Ŝakja-munio vervekiĝis, li turnis sin al siaj iamaj kunpraktikantoj kaj predikis al ili. Ĝia enhavo estas formulita kiel “la kvar noblaj veroj” kaj “la okera vojo” (aŭ “la meza vojo”).

la vero pri la sufero:

Ĝi instruas, ke ĉio, kio havas kaŭzojn kaj kondiĉojn, estas sufero. Ŝakja-munio listis la plej tipajn suferojn jene: naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo, morto, kunesto kun malamataj, apartiĝo de amataj, nehaveblo de dezirataj aĵoj, kaj aktiveco de la kvin elementoj kune komponantaj personon (korpo aŭ materio, sento, imago aŭ ideo, volo, koncepto aŭ kono).

Sufero (sanskrite *duḥkha*, palie dukkha) ne ĉiam signifas doloron. Pli fundamente, ĝi indikas la staton, en kiu ni neniam estas kontentaj spite nian intencon, ĉar ĉio iras kaj okazas ne ĉiam laŭ nia intenco.

la vero pri la origino de la sufero:

Ĝi instruas, ke la sufero havas sian kaŭzon aŭ fonton. Kio estas la kaŭzo? Unuvorte, tio estas homa kleŝo (sanskrite *kleśa*, palie *kilesa*) aŭ negativa mensa stato, reprezentata de avido, malamo kaj malsaĝo.

la vero pri la halto de la sufero:

Se ni konkeras ĉi supre menciitajn negativajn kaŭzojn, ni povas haltigi la suferon kaj atingi nirvanon, t.e. la finfinan pacon aŭ trankvilon.

la vero pri la vojo al la halto de la sufero:

Por haltigi la suferon, troviĝas la metodo. Tio estas praktiko ekskludanta du ekstremojn, nome hedonismon kaj asketismon. Tial ĝi estas nomata la okera vojo aŭ la meza vojo, konsistanta el la ok branĉoj.

la okera vojo

Kiel ĉi supre dirite, la praktiko por haltigi la suferon estas nomata la okera vojo:

1. ĝusta vido
2. ĝusta penso
3. ĝusta parolo
4. ĝusta faro
5. ĝusta vivo,
6. ĝusta peno,
7. ĝusta atentado
8. ĝusta koncentrado

Oni povas grupigi la ok branĉojn en la tri kategoriojn:

1. precepto: ĝusta parolo, ĝusta faro, ĝusta vivo
2. zeno: ĝusta atentado, ĝusta koncentrado
3. saĝo: ĝusta vido, ĝusta penso

Kaj la ĝusta peno komune subtenas la tri.

la tri dharmaj markoj

En antikva Hindio troviĝis multaj religioj. En pli posta tempo budhanoj sentis necesecon distingi budhismon disde aliaj religioj. Tio estas la tri dharmaj markoj. Kvankam budhismo ne havas fiksitajn dogmon, ili ludas efektive la rolon de normo por difini, kio estas budhismo, kaj kio ne estas budhismo.

Ĉiu formo estas malkonstanta. (*sabbe saṅkhārā aniccā*)

Ni povas facile kompreni, ke ĉio ŝanĝiĝas, alivorte, nenio eternas. Ŝanĝiĝo okazas ĉiun momenton, eĉ se homaj okuloj ne povas percepti etajn ŝanĝiĝojn. Ankaŭ homo ŝanĝiĝas en diversaj niveloj de ĉelo, menso, korpo k.t.p. Per tiu ĉi fakto Ŝakja-munio instruis al ni, ke estas stulte alkroĉi al ŝanĝantaj aĵoj.

Tiu ĉi ideo malaprobas nian ordinaran pensmanieron: ĉio (inkluzive de homo) naskiĝas kaj mortas. Laŭ tiu ĉi marko, nenio naskiĝas nek mortas, se naskiĝo signifas estiĝon el nenio kaj morto signifas malestiĝon en nenion. En la fakto, kiel la moderna fiziko pruvis, tio ne eblas. Ĉio nur ŝanĝiĝas, nome ŝanĝas siajn figurojn, aspektojn, rilatojn, atributojn k.t.p.

Strikte dirite, la signifo de la palia vorto *saṅkhārā* estas “formitaĵoj” aŭ “kondiĉitaĵoj”.

Ĉiu formo estas suferiga. (*sabbe saṅkhārā dukkhā*)

Ŝakja-munio forlasis sian hejmon kaj ekzercis sin dum ses jaroj por solvi suferojn de la homa vivo. Kaj la temo de lia unua prediko estis pri la kvar noblaj veroj pri sufero. Solvi suferon estas la origino de budhismo.

Ĉu vere ĉiu formo estas suferiga? Ĉu budhismo estas pesimismo? Budhismo tamen ne asertas, ke ĉiuj homoj estas malfeliĉaj. Sufero estas la stato, en kiu ni neniam estas kontentaj pro nia egocentrisma deziro. Se ni deziras ion regi laŭ nia egoisma intenco, nia deziro neniam finiĝas kaj neniam kontentiĝas, ĉar deziro mem havas la econ ĉiam grandiĝi; tiam niaj suferoj neniam ĉesas.

Ĉiu ekzistaĵo ne estas atmano. (*sabbe dhammā anattā*)

Atmano (sanskrite *ātman*, palie *atta*, laŭ PIV *atmo*) estas la koncepto elpensita de hinda filozofio, precipe de Upaniŝadoj. Ĝi estas principo de persona memo, kiu ne ŝanĝiĝas kaj ekzistadas senkondiĉe, sendepende de io ajn.

Budhismo emfazas la necesecon vidi la memon kaj la mondon, do ĉion, trankvile kaj sen antaŭjuĝo. Tiam al ni klariĝas, ke ĉiuj ekzistaĵoj inkluzive de homo havas siajn kaŭzojn kaj kondiĉojn, estiĝas laŭ kondiĉoj kaj interrilatas reciproke, kaj ke nenio ekzistas per si mem kiel absoluta ento. Tial budhismo kontraŭstaras la pensmanieron de Upaniŝadoj. Kvankam Ŝakja-munio ne rekte asertis, ke atmano ne ekzistas, li diris, “Nenie mi

povas trovi mian atmanon, neniu ekzistaĵo estas mia atmano.” Se nenie troviĝas atmano, tio efektive signifas, ke atmano ne ekzistas.

Malaprobo de atmano estas ne nur teoriumado. Se ni povas klare vidi neekziston de atmano, tranĉiĝas nia alkroĉiĝo al eterna, eĉ postmorte daŭra vivo. Tiam ni jam ne vekrias pro la fenomeno de morto.

nirvano

Nirvano (sanskrite *nirvāna*, palie *nibbāna*) origine signifis “estingiĝon”. En budhismo, ĝi estas la stato, en kiu ĉiuj kleŝoj (avido, malamo kaj malsaĝo) estas estingitaj rezulte de praktikado. Per pozitiva esprimo, ĝi estas kora trankvileco aŭ libereco. Efektive, nirvano kaj vervekiĝo montras preskaŭ saman staton.

Kiam Ŝakja-munio forpasis, budhanoj uzis la esprimon: “Ŝakja-munio eniris en nirvanon.” Eĉ Ŝakja-munio sentis korpan doloron, dum li estis viva, kompreneble. Kiam lia vivo finiĝis, ĉiaj doloroj sekve finiĝis kaj plena trankvilo venis. Pro tio postaj budhanoj distingis du aspektojn de nirvano: “nirvano kun resto”(antaŭmorta), kaj “nirvano sen resto”(postmorta).

Cetere, la mahajana skolo alprenis la kvaran markon aldone al la tri markoj. Tio estas, “nirvano estas la plena trankvilo”.

la triobla trejnado (praktiko)

Por atingi nirvanon aŭ vervekiĝon necesas praktiko nomata la triobla trejnado el observado de **preceptoj**, **meditado** kaj profundigo de **saĝo**. Ili ne estas sendependaj sed estas interrilataj.

Budhisma precepto estas la bazo de la vivo kiel budhano. Ĝi ne estas ordono de la budho sed estas memdisciplino. Gi faras antaŭkondiĉon por lerni la budhan instruon kaj praktiki meditado. Estas diversaj listoj de preceptoj, por laikoj estas simpla listo, por monaĥoj estas granda listo, por monaĥinoj estas pligranda listo. La plej baza listo estas: ne mortigi, ne ŝteli, ne havi kontraŭmorale seksan rilaton, ne mensogi, ne drinki (por ne esti ebria). Tiuj ĉi preceptoj estas necesaj ankaŭ por ne alporti suferojn al aliaj aŭ al si mem.

Meditado konsistas el du etapoj: unue haltigo de koraj inklinoj, nome trankviliĝo (sanskrite *śamatha*, palie *samatha*), kaj due kontemplado de sia interno kaj eksteraj objektoj (sanskrite *vipaśyanā*, palie *vipassanā*). Ankaŭ zeno estas unu el la manieroj de meditado. Diversaj skoloj havas siajn proprajn manierojn kaj metodojn.

Saĝon oni profundigas per la tri metodoj. Unue per lernado de budhaj instruoj, due per pripensado de lernitaj instruoj, kaj trie per praktikado de la instruoj, nome per observado de preceptoj kaj meditado.

tripitako

Budhisma kanono estas nomata tripitako. Ĝi konsistas el tri kategorioj: **vinajo, sutro, komentario**.

Vinajo enhavas priskribon de preceptoj, regularon de sangho, biografion de Ŝakja-munio, k.a. Sutro estas la kolekto de dokumentitaj predikoj de Ŝakja-munio, ofte en la formo de himno, konversacio inter Ŝakja-munio kaj liaj disĉiploj, parabolo, k.t.p. Post la forpaso de Ŝakja-munio rektaj disĉiploj kunvenis kaj redaktis vinajon kaj sutron. Kaj pli poste frutempaj monaĥoj verkis komentariojn pri la enhavo de vinajo kaj sutro.

Budhismo, malsame kiel kristanismo kaj islamo, ne havas unusolan kanonon komunan inter ĉiuj skoloj. Theravada budhismo havas la tripitakon en la palia, la mahajana skolo tiun en la ĉina tradukita el la sanskrito, kaj la tibeta skolo tiun en la tibeta tradukita el la sanskrito. Inter ili kelkaj tekstoj estas preskaŭ komunaj, sed aliaj tekstoj iom malsamaj aŭ eĉ tute malsamaj. Budhologoj konjektas, ke la palia kanono estas relative pli bone konservas la budhajn predikojn, dum multaj tekstoj el la sanskrita kanono perdiĝis intertempe. Sed la mahajana skolo aldonis multe da novaj tekstoj, kiujn anonimaj bodhisatvoj² verkis kaj imputis al parolo de Ŝakja-munio.


² Sanskrite *bodhisattva*, palie *bodhisatta*. Kunmetita vorto el *bodhi* kaj *sattva* (*satta*). *Bodhi* signifas vervekiĝon kaj *sattva* signifas vivestaĵojn. Origina signifo do estas tiuj, kiuj deziras vervekiĝon. En la komenco oni uzis la vorton por indiki Ŝakja-munion antaŭ lia vervekiĝo. Poste ĝi signifis en pli vasta senco homojn, kiuj praktikas por sia vervekiĝo, kaj ankaŭ imagitajn personojn-helpantojn de budho.



Biblioteko de 81258 ksilografaj tabuloj, konservataj en la templo Haeinsa en Koreio. Ili estis ĉizitaj inter 1236-1251. La aro estas la plej malnova kolekto, tial ĝi faras la originalan tekston de la nun legataj tripitakoj en la ĉina versio.



En pre-modernaj tempoj la palia tripitako ne estis eldonita en libroformo, sed skribita sur maldikaj tranĉaĵoj de ligno (aŭ palma folio, aŭ bambua plato).



Mankopiita tripitako en la tibeta versio, konservata en la Nacia Muzeo en Mongolio. Skribita sur papero per nigra inko.

2. Vivo de Ŝakja-munio

naskiĝo

Ŝakja-munio naskiĝis antaŭ ĉ. 2500 jaroj en la vilaĝo Lumbini, kiu nun troviĝas en Nepalo, kiel filo de unu el la estroj de la lando “Ŝakja”. “Munio” signifas sanktulon, do Ŝakja-munio estas “sanktulo de Ŝakja”. Lia nomo estas Gotama Siddhattha (palie) aŭ Gautama Siddhārtha (sanskrite).

Estas diversaj asertoj pri lia naskiĝjaro. Laŭ la tradicia kronologio de la theravada skolo li vivis 624-544 a.K.; laŭ tiu de la mahajana skolo 566-486 a.K.; laŭ modernaj budhologoj-historiistoj ĉ.463-383 a.K. Estas certe, ke li vivis 80 jarojn.

Lia familio apartenis al aristokrataro. Lia patro, kiel armeestro aŭ reĝo, regis la landon de Ŝakja, kies ĉefurbo estas Kapilavastu (Kapilavatthu). Estas du asertoj pri la ekzakta loko de tiu antikva urbo: Tilaurakot en Nepalo aŭ Piprahwa en Barato. Arkeologoj ne koincidas inter si. Sed ĉiuokaze ĉirkaŭ la landlimo inter Nepalo kaj Barato.

Li povis ĝui riĉan kaj feliĉan vivon kiel reĝido, sed ne estis kontenta pro tio. Estas la fama legendo: Iam li volis ekskursi al eksterurbo kaj eliris el la palaco. Tiam li renkontis unue kadukulon, due malsanulon, trie mortinton, kaj fine ŝramanon. Tiu sperto igis lin pensi pri la signifo de vivo. Li poste rakontis pri si mem al siaj disĉiploj jene:

“Naskita en tia riĉa familio mi estis feliĉa. Mi tamen pensis: Stultuloj, kvankam ili mem ne povas eviti maljuniĝon, ne konscias pri sia maljuniĝo kaj malŝatas maljunulajn aspektojn. Ankaŭ mi maljuniĝos. Tiel pensante, mia fiero pri mia juneco estis for.” (Li ripetis la samon ankaŭ pri malsaniĝo kaj morto.)

ekzercado

Kiam li iĝis 16-jaraĝa, li edziĝis al Jasodara. Kaj dek jarojn pli poste naskiĝis ilia filo, Rahula. Kiam li iĝis 29-jaraĝa, li forlasis la hejmon spite peton de la familianoj. En antikva Hindio estis la kutimo, ke maljunuloj forlasas hejmon kaj pasigas kvietan vivon en arbaro. Tial forlasi hejmon estas ago ne tre eksterordinara, sed li estis tro juna por sekvi la kutimon. Lia motivo estis solvi la suferojn kaŭzatajn de maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto.

Li sin direktis al Raĵagaha, la ĉefurbo de Magadha, unu el la plej grandaj landoj en la antikva Hindio, ĉar ĝi estis la centro de kulturo, scienco kaj

religio. Tie li lernis de du ŝramanoj, aŭ liber-pensuloj: Alara Kalama kaj Uddaka Ramaputta. Ambaŭ estis gvidantoj de joga meditado. Li baldaŭ ellernis la manieron de tiu meditado kaj atingis la plej altan staton same kiel la du gvidantoj. Sed li ne povis esti kontenta pro tio, ĉar per meditado sola, laŭ Ŝakja-munio, oni ne povas solvi la problemojn de suferado. Dum meditado ni povas esti trankvilaj for suferoj, sed post meditado nia estomaniero ne ŝanĝiĝas kaj suferoj restas.

Ŝakja-munio adiaŭinte la du gvidantojn komencis praktiki asketismon. Fasti, haltigi spiradon, ne dormi, manĝi fekon... Post tia severa asketismo al lia korpo restis preskaŭ nur ostoj kaj haŭto, kaj li apenaŭ ne mortis. Sed tio ne kondukis lin al lia celo, al solvo de suferoj.

vervekiĝo

Forĵetinte asketismon, li regajnis forton kaj denove praktikis meditadon. Ĉi-foje li ne nur trankviligis la koron, sed akiris sian atenton, kontemplan sian internon kaj observis eksteran mondon. Kiam li iĝis 35-jaraĝa, nome ses jarojn post forlaso de la hejmo, li atingis la staton de vervekiĝo. Tio estis en Bodhgaya en la nuna gubernio Bihar.

Je kio li vervekiĝis? Aŭ kion konkrete signifas la vero, kiun li kaptis? Estas diversaj klarigoj, kaj estas malfacile klarigi per vortoj. Sed multaj budhologoj diras, ke la ŝlosilvorto de lia vervekiĝo estas "laŭkondiĉa estiĝo" (sanskrite *pratītya-samutpāda*, palie *paṭicca-samuppāda*): ĉiuj aĵoj estiĝas depende de aliaj aĵoj, aŭ ĉiuj aĵoj havas kaŭzojn kaj kondiĉojn. Tio praktike signifas, ke oni povas liberiĝi de suferoj, ĉar suferoj havas siajn kaŭzojn kaj kondiĉojn, estante neniel fiksitaj.

prediko

Dum kelka tempo li estis ĝoja kaj kontenta pro la vervekiĝo. Sed li decidis, ke li devus komunigi la sperton kun aliaj homoj. Li unue celis kvin iamajn kolegojn dum la asketa vivo. (Iamaj du gvidantoj jam forpasis tiam.)

La unua prediko okazis en Sarnath, proksime de Varanasio. La enhavo de la unua prediko konsistis el la kvar noblaj veroj kaj la okera meza vojo, pri kiuj estas jam klarigitaj. La kvin kolegoj iom post iom konvinkiĝis pri la prediko kaj ĵuris rifuĝi al la budho Ŝakja-munio. Tiel ekestis la unua sangho el ses sanktuloj.

grandiĝo de la sangho

Post la ekesto de la unua sangho, ankoraŭ aldoniĝis pli kaj pli multe da novaj adeptoj; iuj forlasis hejmon kiel monaĥoj, aliaj restis hejme kiel laikaj kredantoj. Inter gravaj disĉiploj estis kelkaj gvidantoj de aliaj religioj, ekzemple Sariputta, Moggalana, tri fratoj de Kassapa, k.a. Tiel la sangho subite grandiĝis.

Estas ne eble, ke la grandiĝinta sangho restas en sama loko grupe. Ŝakja-munio ordonis misian migradon al monaĥoj, kaj mem migris tra la tuta norda Hindio. Tiamaniere la sangho disvastiĝis.

Kiam Ŝakja-munio vizitis sian landon, liaj familianoj kaj parencoj ĝoje akceptis lin. Kelkaj el ili eĉ deziris aniĝi al la sangho kiel monaĥoj. Ekzemple Rahula (lia filo), Nanda (lia frato), Devadatta (lia kuzo), Anuruddha (lia kuzo), Ananda (lia kuzo). Ananda ludis la rolon de la sekretario de Ŝakja-munio kaj ĉiam akompanis lin.

La sangho kaptis adeptojn kaj subtenantojn ankaŭ en la tavolo de potenculoj kaj riĉuloj. Interalie Bimbisara, la reĝo de Magadha, mem ofte aŭskultis instruojn de Ŝakja-munio, kaj Sudatta, riĉulo en Kosala, donacis la grandan viharon (monaĥejon) nomatan Ĵetavana. Tio ankaŭ helpis subitan grandiĝon kaj disvastiĝon de la sangho.

morto

Misia migrado senĉese daŭris dum 45 jaroj. Sufiĉe maljuniĝinta Ŝakja-munio grave malsaniĝis kaj haltis sian paŝon en la vilaĝeto Kushinagar en la lando Malla, ĉ. 150 kilometrojn norde de Varanasio. Eĉ en la lasta momento venis nova deziranto, kiu volas intervidiĝi kun li. Ananda volis rifuzi lin, sed Ŝakja-munio akceptis lin kiel la lastan disĉiplon kaj kuŝante faris la lastan predikon: “Ĉio estas efemera; vi diligente plenumu vian praktikon.”

Lastan momenton ĉeestis nur kelke da disĉiploj, ĉar multaj estis en aliaj lokoj por misia migrado. Laikaj adeptoj kremaciis lin. Restis liaj ostoj. Estis kverelo pri tio, kiu posedu liajn relikvojn. Iu proponis, ke la relikvoj estu disdonitaj al la ok landoj, kaj tiel estis farite. Magadha, Malla, Ŝakja, kaj aliaj. Ili konstruis stupaojn kaj metis la relikvojn en ilin. Pli poste ili estis disdonitaj al pluraj potenculoj, kiuj siavice konstruis stupaojn (aŭ pagodojn). Nuntempe multaj stupaoj staras en aziaj landoj kun diversaj grandecoj kaj formoj, sed kompreneble ne ĉiuj el ili konservas la relikvojn.

En 1989 W. C. Peppe, brita, elfosis la stupaon en Piprahwa, kaj tie trovis unu poton, kiu enhavis fragmentitajn ostojn kaj cindron. Sur la flanko de la pota estis ĉizita la frazo el antikvaj literoj, kiu signifas: "Tiu relikvo-sanktejo de dia Budho (estas la donaco) de sanktaj Ŝakja-anoj..." Per tio ĉi oni konfirmis la realecon de Ŝakja-munio, pri kies reala ekzisto kelkaj historiistoj dubis ĝis tiam.



En la komenco oni ne havis kulton adori budhan statuon. Sed post kiam la armeo de Aleksandro la Granda invadis la nordan Hindion, greka kulturo influis sur budhanojn en Gandhara. Tial la stilo de budhaj statuoj en tiu ĉi regiono reflektas tiun de diaj statuoj en Grekio.

3. El Sutroj

La tripitako estas tre grandioza, kaj troviĝas multege da sutroj. Jen estas du sutroj el ili. La unua el la palia, populara en la theravada skolo, temas pri *metta*, senlima amo. La dua el la sanskrita, populara en la mahajana skolo, temas pri *prajñā*, sendistinga saĝo. Amo kaj saĝo estas la plej gravaj du virtoj de Budho.

La sutro pri la ĉion ampleksanta amo

Metta-Sutta

1. Por sia propra feliĉo tiu, kiu komprenis ĉi tiun trankvilon, estu kapabla kaj sincera, sincerega, konsentema, milda, malfiera,
2. kontenta kaj facile nutrata, havanta malmultajn devojn, facilan kondukon kaj trankvilajn sentojn, saĝa, modesta, inter familioj ne avara.
3. Neniel li agu malnoble kaj igu saĝulojn mallaŭdi lin. Feliĉaj kaj sekuraj ili estu. Ĉiuj estaĵoj estu feliĉaj.
4. Kiuj ajn estaĵoj vivas — timemaj aŭ sentimaj, senescepte, longaj kaj grandaj, mezgrandaj, mallongaj, etaj kaj fortaj,
5. videblaj kaj malvideblaj, foraj kaj proksimaj, naskitaj kaj naskotaj — ĉiuj estaĵoj estu feliĉaj.
6. Ne unu la alian trompu, nek malestimu ie ajn. Pro kolero aŭ malico neniu deziru suferon al alia.
7. Kiel patrino propran filon, per sia vivo solan filon protektas — tiel inter ĉiuj estaĵoj li kultivu senliman koron.
8. Ame en la tuta mondo li kultivu senliman koron, supren, suben kaj ĉirkaŭen, senmalhelpe, senmalame, senmalamikece.
9. Starante, irante, sidante kaj kuŝante, dum li ne dormas, tiun atenton li vivtenu. Nobla oni ĉi tie nomas tiun staton.
10. Sen opinioj, virta kaj vidkapabla li ĝudezirojn forigas. Certe li ne denove eniras uteron.

(tradukis Gunnar Gällmo)

Esenca Sutro por Saĝo-Perfektigado

Prajñā-Pāramitā Hrdaya Sūtra

Riverenco al Ĉioscianto.

Bodisatvo sankta Avalokiteŝvaro, praktikante profundan saĝ-perfektigadon, konstatis ke ĉiu ekzistaĵo estas konstruata el kvin elementoj. Plie li penetris ke la naturo de l'elementoj estas tute senenta.

Ŝariputra, en tiu ĉi mondo, ĉia materia fazo estas senenta, kaj pro la senenteco, ĝi formas materion. La senenta fazo ne ekzistas sendepende de materia fazo, same, ankaŭ la materia fazo ne ekzistas disde senenta fazo. La naturo de substanco estas senenta, kaj la senenteco formas ĉian fenomenon. Egale ankaŭ sento, percepto, intenco, kaj scio ne havas sian enton. Ŝariputra, en tiu ĉi mondo, la naturo de ĉiu ekzistaĵo estas senenta, nek malpuriĝas kaj neniom konsumiĝas nek pliiĝas.

Tiel, Ŝariputra, ĉe la fazo senenta, nenie estas materio, nek orelo nek nazo, nek lango nek korpo, nek volo. Formitaĵo videbla, sonoro aŭdebla,odoro flarebla, gusto gustumebla, objekto palpebla, kaj celo intencebla, ĉio ne ekzistas.

De la videbla amplekso ĝis la sciebla amplekso, neniu ento ekzistas.

Nenie oni trovas trankvilon nek iluzion, sed neniam perdos la trankvilon nek liberiĝos el la iluzio. Fine oni atingas staton kie ne estas kadukiĝo nek morto, sed ne liberiĝas el ili. Tie oni ne trovas suferon, suferamason, subpremado kaj subpremvojon. Nenion oni scios, nenion oni gajnos.

Per la sengajneco, oni trankviliĝas konfidante bodisatvan saĝ-perfektigadon, kun sia koro ne kovrita de iluzia nebulo. Tiam oni timas nenion, kaj vivas en eterna paco, sin liberiginte el renversita iluzio. Budhoj estintaj, estantaj, kaj estontaj atingas la plej superegan vastan versaĝon per la saĝ-perfektigado.

Do, vi sciuj, ke la granda mantro de l'saĝ-perfektigado, la granda versaĝa mantro, la superega mantro, la senkompara mantro subpremas ĉian suferon, kaj ĝi estas eterne vera ĉar malfalsa. La mantro estas jene predikita en la saĝ-perfektigado.

*gate gate pāragate pārasaṃgate bodhi svāhā.*³

Jen fino al la esenco de l'saĝ-perfektigado.

(trad. Ikeda Hiroŝi)

³ Atinginto, atinginto, purbordon-atinginto, purigbordon-elatinginto, versaĝo, hura.

4. Budhismo en la mondo

diversaj skoloj

theravada skolo

La sangho tenis unuecon en la komenca tempo. Sed ĉ. 100 jarojn post la forpaso de Ŝakja-munio okazis diskuto rilate al kompreno de vinajo. Unu asertis striktan komprenon kaj alia pli flekseblan komprenon. Pro tio la sangho skismis en du grupojn. Poste la du grupoj plu skismis, maksimume en 20 skolojn (aŭ 18 skolojn). Unu el ili transiris al Srilanko kaj tie sin nomis “theravado” (laŭlitere signifas “instruon de plejaĝuloj”). Tiu ĉi skolo disvastiĝis ankaŭ en Tajlando, Birmo (Mjanmaro), Kamboĝo kaj Laoso.

Tiu ĉi skolo estas bazita sur la palia versio de la Tripitako. La palia lingvo estas unu el la parolaj lingvoj en antikva Hindio. Ĝi ludis/-as la rolon de komuna lingvo en la theravada budhismo por gemonahoj, same kiel la latina en katolikismo.

mahajana skolo

La origino de la mahajana skolo ne nepre klaras. Dum la skisma tempo en Hindio ĉiuj skoloj havis la tendencon koncentriĝi al ekzegezo kaj ne interesiĝis pri la vivo de popolanoj. Monahoj kaj laikoj malkontentaj pro ili komencis la movadon nomatan “mahajano” (laŭlitere signifas “granda veturilo”), kritikante la establitajn skolojn “hinajano” (laŭlitere signifas “malgranda veturilo”). Estas notinde tamen, ke neniam troviĝis la skolo, kiu fakte sin nomis “hinajano”.

Tiu ĉi skolo estas bazita sur la sanskrita versio de la Tripitako, kaj disvastiĝis tra la centra Azio ĝis Ĉinio, Tibeto, Mongolio, Vjetnamio, Koreio kaj Japanio. Dume la sanskrita Tripitako perdiĝis, sed anstataŭ ĝi la ĉina kaj la tibeta versioj respektive tradukitaj el la sanskrita ludis la rolon de komuna lingvo.

Mahajana skolo pli poste dividiĝis en multaj subskoloj: zena, girlanda, lotusa, purlanda, mantra, k.t.p. Ilia diferenco estas bazita sur tio, kiun rigardi la plej centran el multege da sutroj.

tibeta skolo (vaĝrajana skolo)

La tibeta budhismo estas unu el la mahajanaj skoloj. Sed ĝi havas iom specialan karakteron, dum aliaj mahajanaj skoloj havas pli malpli ĉineskan karakteron. Nome, ĝi heredis la posttempan hindan budhismon de la 8-a jarcento, kies ĉefaj trajtoj estas alpreno de esoterismo kaj preciza studo de logiko. Ĝi estas disvastiĝinta ne nur en Tibeto, sed ankaŭ en Butano, Mongolio, kaj en kelkaj regionoj de Hindio, Nepalo, Ĉinio. Ĝia tripitako en la tibeta lingvo estis rekte tradukita el la sanskrita.

Post la invado de Ĉinio en Tibeton en 1956, gvidantoj de la tibeta budhismo rifuĝis en aliaj landoj, inkluzive de Dalai-lamao la 14-a en Hindio; tio kaŭzis iusence disvastiĝon kaj internaciigon de la tibeta skolo. (Cetere Dalai-lamao estas gvidanto ne de la tuta tibeta budhismo sed de la subskolo Gelgupa.)

novaj budhismoj

Krom la menciitaj tradiciaj skoloj troviĝas kelkaj novaj budhismoj aŭ religioj influitaj de budhismo. Kelkaj el ili, kiel ekzemple Sokagakkai (Japanio), Ŭonbulismo (Koreio), Hoa Hao (Vjetnamio), Falun Gong (Ĉinio), k.t.p., havas kredantojn en pluraj landoj.

budhismaj landoj

Ĉinio

244 milionoj da budhanoj (18% de la loĝantaro). 13 mil temploj kaj 400 mil monaĥoj. Ĉefe mahajana, parte tibeta.

Iam en kelkaj dinastioj budhismo estis ŝtata religio, kaj ĝia influo sur kulturo, filozofio, arto, politiko, k.t.p. estis tre granda. Dum la Kultura Revolucio budhismo (kaj aliaj religioj) estis severe persekutita. Nun la ĉina registaro mildigis sian politikon kaj aprobas relative liberan aktivadon de budhanoj. Pli kaj pli multe da ĉinoj ŝatas viziti templojn, sed ili ne nepre bone konas budhan instruon, adorante antaŭ budha statuo por sia profito.

Japanio

96 milionoj da budhanoj (80% de la loĝantaro) laŭ oficiala statistiko, sed en realo multe malpli, ĉar multaj japanoj estas registritaj kaj kiel budhanoj

kaj kiel ŝintoanoj. Tio signifas, ke japana religio estas sinkretisma. (Tiu ĉi tendenco videblas pli malpli en multaj budhismaj landoj.) Ĉefe mahajana.

Japana budhismo havas la karateron de sekularismo. Tio estas, ke da monaĥoj en la strikta senco de la vorto estas tre malmulte, kaj en Japanio tiuj, kiuj loĝante en templo predikas instruojn, estas nomataj bonzoj. Preskaŭ ĉiuj bonzoj havas sian familion. Troviĝas 77 mil temploj kaj 390 mil bonzoj.

Tajlando (Siamo)

65 milionoj da budhanoj (95% de la loĝantaro). Troviĝas 30 mil temploj kaj 400 mil monaĥoj. Preskaŭ ĉiuj theravadaj.

Laikaj budhanoj volonte subtenas monaĥan vivon, kredante ke donaco al monaĥoj donos al ili grandan meriton postmorte. Sed la plej grandan meriton, laŭ ilia sento, alportas la ago fariĝi mem monaĥo, aŭ se ne, farigi sian familianon monaĥo. Tial multaj junuloj almenaŭ unu fojon dum unu aŭ du semajnoj praktikas sin en sangho kiel novicoj antaŭ edziĝo. Lastatempe multiĝas monaĥinoj nomataj "*maechi*", sed en taja tradicia sangho ili ne estas aprobitaj kiel oficialaj bikŝuinoj.

Birmo

46 milionoj da budhanoj (90% de la loĝantaro). Troviĝas 59 mil temploj (monaĥejoj, ne pagodoj), kaj 550 mil monaĥoj kaj 43 mil monaĥinoj (*thilashin*, same kiel en Tajlando ili ne estas oficiale aprobitaj). Preskaŭ ĉiuj theravadaj.

Antaŭe la militreĝimo severe regis la sanghon, kaj ne malmulte da monaĥoj kune kun popolanoj postulis demokratiigon de la reĝimo. Pro tio okazis politikaj konfliktoj kaj kontraŭreĝimaj monaĥoj estis murditaj.

En 1954 okazis la 6-a Koncilio, kiu redaktis la novan kaj precizan version de la Tripitako. Tiu ĉi versio nun estas la plej prestiĝa en la theravada budhismo, anstataŭante la ĝistiaman version faritan de *Pali Text Society* en Londono.

Srilanko

14 milionoj da budhanoj (70% de la loĝantaro). Troviĝas 6 mil temploj kaj 15 mil monaĥoj. Preskaŭ ĉiuj theravadaj.

Pro la kolonia regado de eŭropaj landoj ekde la 16-a jarcento, la budhismo en tiu ĉi lando subite malkreskis, eĉ preskaŭ pereis. Ĝi reviviĝis pro la helpo de la tajlanda kaj birma budhismo, kaj revigliĝis ekde la dua

duono de la 19-a jarcento pro la helpo de britaj studentoj kaj teozofoj. Ili ludis la rolon de peranto de budhismo al Eŭropo.

Dum en aliaj landoj de theravada budhismo la ekzisto de monaĥina sangho ne estas aprobita, nur en Srilanko oni revivigis oficialan monaĥinan sanghon, spite la kontraŭstaron de konservativuloj. Por ĝia revivigo, monaĥinaj sanghoj en Koreio kaj Tajvano multe laboris. Ĉi tio faras unu ekzemplon de internacia kaj interskola ekumena budhismo.

Vjetnamio

14 milionoj da budhanoj (16% de la loĝantaro). Troviĝas 15 mil temploj kaj 36 mil monaĥoj kaj monaĥinoj. Ĉefe mahajanaj kaj parte theravadaj, kiuj lastatempe iom post iom multiĝas. Aldone, iomete da hoahao-istoj, anoj de la nova budhismo nomata "Hoa Hao".

Dum la Vjetnama milito la norda reĝimo socialista protektis religiojn kaj agnoskis liberecon de religioj, sed la suda reĝimo, kies prezidento estis katoliko, persekutis budhismon kaj favoris katolikon. Por montri proteston kontraŭ la registaro Tich Quang Duc sin bruligis, kaj tio donis egan ŝokon al la tuta mondo.

Post la fino de vjetnama milito, la registaro de la unuiĝinta Vjetnamio decidis administri ĉiujn templojn kaj monaĥojn metante ilin sub la tegmentan organizon. Kelkaj monaĥoj ne volantaj aparteni al tiu organizo rifuĝis al Eŭropo kaj Usono. Tich Nhat Hanh estas unu el tiuj.

Kamboĝo

14 milionoj da budhanoj (90% de la loĝantaro). Troviĝas 4 mil temploj kaj 63 mil monaĥoj. Preskaŭ ĉiuj theravadaj.

La konstitucio de Kamboĝo difinas la theravadan budhismon kiel ŝtatan religion. (Krom Kamboĝo, Butano traktas budhismon kiel ŝtatan religion, Srilanko kiel kvazaŭ-ŝtatan religion.) Tio tamen ne signifas, ke la ŝtato ne permesas aliajn religiojn.

Dum la regado de Ruĝaj Kmeroj de 1975-1978 ĉiuj religioj estis malpermesitaj; ĉiuj monaĥoj devis labori kiel kamparanoj aŭ estis murditaj, ĉiuj temploj estis detruitaj, kaj ĉiuj religiaj agoj estis malpermesitaj. Budhismo iom post iom revigliĝis, sed kun granda malfacileco.

Troviĝas ĉ. 10 mil laikaj praktikantoj loĝantaj en temploj, plejparte virinaj. Ili tranĉis sian hararon, portas blankan robon, observadas 8 aŭ 10 preceptojn, ĉantas sutrojn, helpas monaĥojn k.t.p. Kelkaj el ili studis en Tajlando kaj eĉ instruas budhismon al junaj monaĥoj.

Koreio

11 milionoj da budhanoj (23% de la loĝantaro). Troviĝas 1.8 mil temploj kaj 12 mil gemonahoj (monahinoj estas iom pli multaj ol monahoj). Ĉefe mahajanaj.

Historie la korea budhismo devis alfronti kelkajn konkurantojn. Dum la feŭdisma tempo la kortego alprenis konfuceanisman kiel ŝtatan religion kaj persekutis budhismon. Dum la kolonia regado de Japanio, japanaj budhismaj skoloj sinsekve venis kaj ekspansiis. Post la milito kristanismo disvastiĝis kaj ĝia kultura kaj politika potenco ofte superis tiun de budhismo.

La plej populara estas zena budhismo, sed lastatempe la nova budhismo nomata “ŭonbulismo” (cirkla budhismo) furoras ne nur enlande sed internacie. Unu el ĝiaj oficialaj lingvoj estas Esperanto. Sed ŭonbulanoj ne havas rektan rilaton kun aliaj tradiciaj skoloj kaj la ŝtata oficiala instanco traktas ĝin kiel memstaran religion.

Tajvano

8 milionoj da budhanoj (35% de la loĝantaro). Troviĝas 2 mil temploj kaj 18 mil monahinoj kaj 2 mil monahoj. Ĉefe mahajanaj, parte theravadaj kaj tibetaj.

Same kiel Koreio, influite de ĉina budhismo, estas multaj temploj zenaj kaj purlandismaj. Popolanoj ofte havas kredon miksitajn kun taoismo kaj konfuceanismo. Kelkaj grupoj aktivas ankaŭ en eksteraj landoj.

Hindio (Barato)

Laŭ la oficiala statistiko 8 milionoj da budhanoj (0.8% de la loĝantaro), sed veŝajne pli multe, eble kelkdek milionoj.

Kun la ekspansio de hinduismo kaj islamo, budhismo iom post iom perdis sian potencon kaj en la 13-a jarcento ĝi preskaŭ malaperis. Oni povus sugesti du kaŭzojn de la malapero: pro miksiĝo kun hinduismo budhismo jam ne havis sian ekzistokialon, kaj islama potenco persekutis budhanojn.

Nun budhismo en tiu ĉi lando konsistas el kvar kategorioj: bengala, theravada, tibeta, kaj “nova”. La bengala budhismo heredas la esoterisman budhismon en la malnova tempo, sed ĝia komunumo estas malgranda. La theravada budhismo estis enkondukita el srilankaj budhanoj pro la klopodo de Dharmapala. La tibeta budhismo estas tradicie tenata en la norda

regiono. Post la rifuĝo de Dalai-lamao la 14-a kaj aliaj gvidantoj pli kaj pli multaj tibetanoj kiel rifuĝantoj formas komunumon. La tiel nomata “nova” budhismo⁴ estis iniciatita de Ambedkhar, dalito (diskriminaciata klaso) kaj la patro de la hinda konstitucio. Post lia morto la budhisman movadon fare de diskriminacioj gvidas Sasai Syûrei, japandevena monaĥo. La nombro de budhanoj nun atingas laŭ ili 150 milionojn⁵.

Malajzio

5 milionoj da budhanoj (17% de la loĝantaro). Kvankam la ŝtata religio estas islamo, plejparto de la ĉindevenaj loĝantoj praktikas la mahajanan budhismon. Theravadaj budhanoj ankaŭ troviĝas. La ŝtata konstitucio ne malpermesas agadon de ĉiuj religioj, sed tio estas ebla nur en la kondiĉo, ke ili ne envolvas malajzojn t.e. islamanojn.

Krom ĉi supraj ŝtatoj oni povas mencii ankoraŭ kelkajn landojn, kie budhanoj kolektive praktikas, aŭ pluraj sanghoj daŭre aktivas: Laoso, Butano, Indonezio, Nepalo, Bangladeŝo, Mongolio. Sed se atenti pri la nombro de budhanoj, oni devus mencii Usonon kaj Eŭropon.

Usono


3 milionoj da budhanoj (1% de la loĝantaro).

En Usono loĝas multaj etnoj, kaj konsekvence agadas multaj religioj. En Los-Anĝeleso troviĝas pli ol 80 sanghoj aŭ skoloj devenantaj el aziaj landoj. Preskaŭ ĉiuj budhismaj skoloj ĉi tie kunekzistas sen konflikto.

Krom 3 milionoj da budhanoj, kiuj sin rekonas budhanoj, troviĝas ankoraŭ 3 milionoj da simpatiantoj. Ili kutime legas budhismaj librojn, de tempo al tempo portempe partoprenas praktikadon en sangho, kaj mem meditas en sia hejmo. Ankoraŭ pli multaj estas tiuj, sur kiujn budhismo iamaniere donis influon.

⁴ Adeptoj de la budhismo, kiuj estas nomataj “novaj” (*neo-buddhists*), tamen ne uzas tiun ĉi esprimon. Ili nomas sin simple “*buddhist*” (*bauddha*). Studentoj uzas ofte “konvertitaj budhanoj” (*converted buddhists*, aŭ *embraced buddhists*).

⁵ Sasai asertas tiel, sed efektive iom troigita nombro.



(farita de Yajima Hiroshi)

5. Esperanto kaj Budhismo

Kiam oni rigardas lingvon nur kiel komunikilon, tiam lingvo estas la ekstera formo. Tiam mesaĝo mem pli gravas ol la ekstera formo. Mesaĝo ne varias sendepende de lingva formo, ĉu esprimata en Esperanto, ĉu en la angla, ĉu en la latina, k.t.p. Por tiuj budhanoj, kiuj deziras disvastigi budhismon en la mondon, estas tute natura sinteno uzi la anglan kiel rimendon, ĉar la angla estas la plej disvastiĝinta lingvo kaj la plej efika rimedo. Fakte en la okazo, kie kunvenas budhanoj el pluraj landoj, ili parolas plejparte en la angla.

Kial anoj de Budhana Ligo Esperantista tamen uzas Esperanton por disvastigi budhismon? Kial budhana Esperanto-movado necesas, spite tion, ke ne ekzistas budhana franclingva movado, nek budhana ĉinlingva movado...? En la mondo ne ekzistas lando, kie oni parolas ĉefe Esperanton, ĉu ne? Ĉu budhana Esperanto-movado ne estas malefika kaj vana klopodo? Se oni komprenas, ke lingvo estas nur komunikilo, tiuj ĉi demandoj estas tute pravaj.


Sed lingvo estas ne nur la rimedo aŭ la ilo, per kiu oni transdonas informojn kaj interŝanĝas ideojn. Ĝi estas uzata kun la interrilato al socio kaj kulturo. Ĝi havas kulturon kaj estas mem kulturo. Ankaŭ Esperanto havas kulturon. Troviĝas la kulturo komune posedata de esperantistaro. Tiu ĉi kulturo inkluzivas pensmanieron aŭ valor-orientiĝon de esperantistoj. Ĝi povus esti resumita en la tri punktojn:

1. Respekti la diferencon inter naciaj kulturoj.
2. Amikiĝi kun homoj trans ŝtatoj, nacioj, religioj, klasoj, k.t.p.
3. Esti neŭtrala rilate politikajn kaj religiajn opiniojn kiel komunumo.

Tiamaniere la valor-orientiĝo de esperantistaro estas simila al tiu de budhanaro. Budhismo estas antaŭ ĉio monda religio; ĝia instruo estas celata al ĉiuj homoj kaj ne al specifaj nacioj. Kaj ĝi emfazas toleremon, kritikas perfortan kontraŭstaron, malaprobas "justan" aŭ "sanktan" militon. Por budhanoj gravas saĝo kaj kompatato. Nacio, ŝtato, klaso, politika opinio, k.t.p. ne gravas, kaj estas eĉ obstakloj, se ni alkroĉiĝas al ili. Diferenco inter nacioj ne estas gravaj, ne indas esti alkroĉita. Laŭ budhisma vidpunkto la reala mondo estas plena de kleŝoj kaj suferoj. Kontraste al tio la mondo de nirvano (aŭ purlando) prezentas la vidpunkton relativigi kaj kritiki la realan mondon, metante grandan gravecon al kompatato

sendistinge al ĉiuj vivestaĵoj kaj al saĝo libera de ĉiaj dogmoj. Kaj plue, intereso de budhanoj sin direktas ne nur al sia interno sed ankaŭ la ekstero, nome al socio, ĉar kompato postulas tion.

Budhana Esperanto-movado celas ne nur uzi la lingvon Esperanton por komunikiĝi inter malsamnaciaj budhanoj, multigi la nombron de budhanoj en Esperantujo aŭ de esperantistoj en budhana rondo, sed starigi la socion, en kiu ĉiuj vivestaĵoj egale ĝuas sian vivon donacitan de ĉiuj naturaj kondiĉoj - ne de dio nek de budho. La plej fundamenta doktrino de budhismo estas nomata "la leĝo de laŭkondiĉa estiĝo". Ĝi signifas, ke ĉiuj aĵoj ekzistas nur kondiĉite de aliaj ekzistaĵoj, kaj ke nenio ekzistas per si mem sendepende de aliaj ekzistaĵoj. Tiu ĉi leĝo povas esti ankaŭ nomata "dependanta estiĝo". Tial budhanoj emfazas amikan kaj pacan kunekziston de ĉiuj vivestaĵoj apartenantaj al malsamaj nacioj, etnoj, landoj, lingvoj, ideologioj, kaj eĉ religioj. Tiu ĉi ideo naskita antaŭ 2500 jaroj en la antikva Hindio kaj disvolviĝinta en Azio bone harmonias kun tiu de multaj esperantistoj.



(farita de Ĝan Ŭesli Starling)

6. Budhana Ligo Esperantista (BLE)

historio

Budhana Ligo Esperantista fondiĝis en la jaro 1925. Ĉirkaŭ tiu ĉi jaro kelkaj budhanaj esperantistoj dise troviĝis en Eŭropo. Kaj A. C. March, ĉefredaktoro de la gazeto "Buddhism in England", komencis havi Esperantan kolumnon. Tio kaŭzis la komencon de korespondado de budhanaj esperantistoj kaj rezultis la unuan fondon de Budhana Ligo Esperantista. March fariĝis la prezidanto. En 1931 la ligo komencis eldoni la bultenon "La Budhismo", kiun redaktis Geo Yoxon.

Dume en Japanio studentoj de la budhismaj universitatoj, Ŭtani, Ryŭkoku k.a., havis Esperantajn kursojn, kaj la kursanoj memvole fondis universitatajn klubojn. Ŝibajama Zenkei, kiu poste fariĝis la prezidanto de la skolo Nanzen-zi (unu el la zenaj skoloj), eldonis sian tradukon de "Dek Bildoj de Bovpaŝtado", fama verko de zena budhismo. En la jaro 1931 fondiĝis Japana Budhana Ligo Esperantista (JBLE). Ĝi eldonis la bultenon "La Lumo Orienta".

La du ligoj ne havis oficialan rilaton inter si, sed bone kunlaboris, ekzemple ili interŝanĝis reciproke bultenojn kaj iliaj membroj ofte korespondadis. Kompreneble tiutempe la rimedo de korespondato estis limigita al poŝta letero, sed legante malnovajn bultenojn oni povas scii, kiel ili interŝanĝis opiniojn.

Same kiel ĝenerala Esperanto-movado, BLE kaj JBLE ne povis esti aktivaj jam antaŭ la dua mondomilito. "La Budhismo" ĉesis eldoniĝi en 1936 kaj "La Lumo Orienta" en 1937. Sed la malaktivado de BLE rekte kaŭzis ne milito sed malforteco de la organizo mem. Tiutempe la agado de BLE estis limigita al eldonado de bultenoj, por kio klopodis nur unu aŭ du volontuloj. Tia malforteco daŭris ankaŭ post la dua mondomilito.

Post la milito, BLE estis refondita en 1948 fare de Rudolf Petri (Anuruddha kiel monaĥa nomo), kaj ekhavis la bultenon "Darmo". BLE okazigis plurajn fakajn kunsidojn de budhismo dum UK en Munkeno, Meintz, Varsovio, Bruselo, k.a., sed la eldonado de la bulteno ne estis stabila. Kiam la ĉefa aktivulo malsaniĝis, tuj haltis la eldonado, la plej ĉefa agado de BLE. Do la bulteno ŝanĝis la titolon du fojojn: "Budha Lumo", "Budhana Kuriero". Kaj ĉiufoje la reprezentanto ŝanĝiĝis. Dume en

Japanio la stabileco kiel organizo estis tenata, kaj JBLE nombris kelkdek membrojn.

Krom eldonado de bultenoj kaj okazigo de fakaj kunsidoj dum UK, kelkaj anoj tradukis sutrojn, verkis artikolojn pri budhismo, kaj eldonis siajn laborojn libroforme. Jen kelkaj ekzemploj:

- La Dek Bildoj de Bovpaŝtado, 1930, tradukita de Ŝibajama Zenkei
- La Sukhavativjuho (sutro), 1932, tradukita de Nohara Kiuiĉi,
- Budao, 1933, tradukita de Takeuti Tookiti el la angla verko
- La Samanta-Mukhaparivarto (sutro), 1936, tradukita de Nohara Kiuiĉi
- La koro de Budhismo (sistema kurso en Budhismo), 1956, verkita de Nyanasatta
- Tiel parolis la Budho, 1971, tradukita de Anuruddha, kolekto de budhaj predikoj
- La vojo al Nirvano (Dhammapada), 1973, tradukita de Anuruddha
- La Esperanta Verkaro de Ŝibajama Zenkei, 1979
- Sad-Dharma-Pundarika Sutro, 1980, tradukita de Asano Sanĉi
- La Instruoj de Budho (antologio de sutroj), 1983, grupe tradukita de JBLE

Traduki sutrojn estas unu el la gravaj taskoj por budhana Esperanto-movado. Kaj kiel ĉi-supre montrite, multaj sutroj estis tradukitaj. Famaj sutroj estis tradukitaj eĉ plurajn fojojn, ekzemple *Dhammapada* estis tradukita kvin fojojn respektive de malsamaj esperantistoj.

la nuna BLE

La nuna BLE estis refondita en 2002, 18 jarojn post la plej lasta malfondiĝo de BLE. Kelkaj volontuloj utiligante interreton diskutis pri la refondiĝo, kaj tre rapide prepariĝis la projekto. Dum la Universala Kongreso en Fortalezo (Brazilo) okazis la faka kunsido de budhanoj, kiu samtempe fariĝis la refondo-kunsido. Tie oni elektis 8 estraranojn, kies prezidanto estis Gunnar Gällmo. Li skribis jene: “BLE kompreneble provos fari la kutimajn taskojn pri esperantlingva fakorganizo, t.e. informi esperantistojn pri budhismo kaj budhanojn pri esperanto; cetere ĝi provos kontribui al libera interparolo inter budhanoj en malsamaj landoj kaj malsamaj tradicioj kaj labori por pli vasta budhisma literaturo en esperanto.”

La nuna BLE ekhavis vere internacian kaj ankaŭ interskolan karakteron, malsame kiel antaŭa BLE. Antaŭe BLE reprezentis eŭropajn budhanojn ĉefe theravadajn, kaj JBLE reprezentis japanajn budhanojn ĉefe mahajanajn. Ĉi-foje JBLE aliĝis kiel organizo aŭ landa sekcio al BLE. Nun BLE havas 47 individuajn membrojn en Eŭropo, Japanio, Ĉinio, Vjetnamio, Koreio, Nepalo, Usono, Brazilo, Ĉilio, Kubo, Tajvano. Ĝia interskola karaktero videblas el la fakto, ke 8-membran estraron okupis 2 theravadanoj, 3 mahajananoj kaj 2 tibet-budanoj (1 neŭtrala).

Tuj post la refondo-kunsido eldoniĝis la unua numero la bulteno "La Esperanta Budhano", kiu estas regule eldonata ĉiun jaron. Kaj la postan jaron decidiĝis la statuto.

La ĉefaj agadoj de BLE konsistas el, krom eldonado de bulteno, okazigo de faka kunsido dum Universala Kongreso kaj interreta informado. En la individua nivelo, tradukado de budhismaj tekstoj daŭras kaj iom post iom progresas. Jen kelkaj retejoj de BLE kaj rilataj organizoj.

<http://budhana.org> (BLE)

<http://www001.upp.so-net.ne.jp/jble/budhismo.html> (JBLE)

<http://www.budhano.cn> (Budhana Retejo en Ĉinio)

la statuto de BLE

1. Nomo

Nia ligo sin nomas "Budhana Ligo Esperantista", mallongige "BLE".

2. Sidejo

La sidejo de la ligo troviĝas ĉe la adreso de la ĝenerala sekretario.

3. Celo

Inspirite de etika kaj religia tradicio 2500 jaraĝa, kune kaj individue agadi por la liberiĝo de ĉiuj estaĵoj el suferado kaŭzata de avidemo, malamo kaj malkompreno, per la praktikado de la instruo de la Budho strebanta al atentoplena kaj respondeca vivo de ĉiu. Kontribui al la disvastiĝo tiel de Esperanto en la tutmonde etendiĝanta diverstradicia budhana komunumo kiel de la Dharmo (la Instruo) en la Esperanta medio, por la bono kaj feliĉo de la homaro sur paca mondo.

4. Membreco

La ligo havas du membro-kategoriojn, individua membro kaj aligita membro.

- (1) Individua membro estas tiu, kiu sendis aliĝilon kaj pagante abonas la bultenon de la ligo. (Tiu, kiu ne pagokapablas, aŭ kiu loĝas en lando, kie estas malfacile sendi monon eksterlanden, povas esti individua membro senpage, kondiĉe ke la estraro aprobas tion.)
- (2) Aligita membro estas tiu, kiu apartenas al landa sekcio de la ligo kaj tamen ne abonas la bultenon.
- (3) Ankaŭ tiu, kiu ne volas membriĝi al BLE, povas pagante aboni la bultenon.

5. Agadoj

Por atingi la supre menciitan celaron la ligo disvolvas jenajn agadojn:

- (1) eldonadon de la bulteno "La Esperanta Budhano"
- (2) eldonadon de la reta informilo
- (3) diskutadon pri budhismo pere de Interreto
- (4) budhanan fakkunsidon dum UK.
- (5) aliajn laŭbezonajn agadojn

6. Decido

Por decidi necesajn aferojn rilate la agadojn, la ligo havas jenan sistemon.

- (1) diskut-grupo sur Interreto estas la loko, kie oni diskutas pri diversaj temoj. Kiam necesas, ene de la grupo estrarano rajtas proponi ĝeneralan voĉdonon. Tiuj, kiuj ne havas aliron al Interreto, povas partopreni en ĝi, sendante sian opinion per letero al la ĝenerala sekretario.
- (2) La estraro havas la rajton decidi detalojn de la agadoj. Kiam urĝe necesas ia decido, la prezidanto, aŭ la vic- prezidanto (se la unua ne povas plenumi la taskon) povas fari tion.
- (3) La ĝenerala kunsido de la ligo okazas kadre de UK. Ĝi rajtas kaj devas doni aprobon / malaprobon al la faritaj decidoj de la diskut-grupo kaj de la estraro, kondiĉe ke en la kunsido ĉeestas ne malpli ol 10 procentoj de la tuta individua-membraro. Decido de la ĝenerala kunsido superas ĉiujn aliajn decidojn.
- (4) Al ĉiuj decidoj povas partopreni ekskluzive individuaj membroj.

7. Estraro

La estraro konsistas el pluraj membroj, inkluzive de prezidanto, vic-prezidanto, ĝenerala sekretario, kasisto, redaktoro, informanto, administranto de Interreto, k.a.

La ofic-periodo de la estraro estas 3 jaroj. Eblas renovigo de posteno post la ofic-periodo. Ĉiuj estraranoj-kandidatoj devas sin anonci por kandidatiĝo sur la ret-grupo. Kiam pluraj kandidatiĝas sur la sama posteno, oni havas voĉdonon sur la ret-grupo aŭ ĝeneralan baloton far ĉiuj individuaj membroj.

Kiam iu estrarano montriĝas ne taŭga al sia posteno, la ceteraj estraranoj povas ekskludi lin/ŝin eĉ dum la ofic- periodo, kondiĉe ke ili ĉiuj samopinias.

8. Landa (Regiona) Sekcio

En la lando aŭ regiono, kie loĝas pli ol 2 individuaj membroj, ili povas fondi landan aŭ regionan sekcion de la ligo. Ĉiu landa sekcio povas havi sian propran nomon, bultenon, kunsidon, statuton, kaj aliajn organizajn sistemojn, kondiĉe ke ili ne kontraŭstaras la celon de BLE.

9. Financo

La ligo subtenas sian agadon pere de enspezoj el abonkotizoj kaj monoferoj. La kasisto administras la financon kaj devas raporti ĉiujare la rezulton de la financo. La abonkotizon povas decidi la estraro.

10. Ŝanĝiĝo de la statuto

La statuto povas esti ŝanĝita, kondiĉe ke en la ĝenerala kunsido pli ol du trionoj de la tuta individua-membraro ĉeestanta aprobas.

Kiamaniere oni povas aliĝi al BLE?

Ĉiu povas aliĝi al BLE, se li/ŝi abonas nian bultenon. Ni ne havas apartan kategorion de abonanto disde membro. Tiu, kiu volas aĉeti unuopajn numerojn sen membreco, sin turnu al sialanda peranto aŭ rekte al la ĝenerala sekretario. Tiu, kiu volas esti membro de BLE, eltondu (aŭ kopiu) la aliĝilon, kiu troviĝas sur la sekva paĝo kaj sendu ĝin al la ĝenerala sekretario, kaj samtempe pagi abonkotizon (t.e. membro-kotizon) per unu el jenaj manieroj:

- (1) ĝiri en la konton ĉe UEA: blex-b
(indiku vian uea-kodon sur la aliĝilo.)
- (2) ĝiri en la poŝtĝiran konton: 00810-4-113665
en la nomo de "BLE", adreso ĉe s-ro Yamamoto Osamu.
(ne skribu "Budhana Ligo Esperantista")
- (3) sendi poŝtmandaton al s-ro Yamamoto Osamu.

La adresoj de la ĝenerala sekretario kaj de la kasisto:

Yamaguti Sin'iti (ĝenerala sekretario)

<syam-z@wa2.so-net.ne.jp>

Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, Nagoya-si, JP-468-0026

Japanio

Yamamoto Osamu (kasisto)

<zelkovo@m2.cty-net.ne.jp>

Sibagaki-tyô 10-14, Ôbanean, Komono-tyô, JP-510-1242 Japanio

Abonkotizo por 1 numero: 6,50 USD / 5,00 EUR / 650 JPY.

Nia bulteno aperas ne regule, almenaŭ 1 fojon jare. Vi povas pagi kotizon po 1 numero, sed ni konsilas vin pagi por pluraj numeroj, kio certe ŝparas ĝirkoston.

Tiu, kiu ne pagokapablas, aŭ kiu loĝas en lando, kie estas malfacile sendi monon eksterlanden, bv. sendi nur la aliĝilon, enskribinte la kialon sur ĝi. Tiukaze la estraro juĝos, ĉu vi povas esti membro sen pagi kotizon.

Se vi volas aliĝi al la reta diskutgrupo, sendu malplenan mesaĝon al

<Budhana_Ligo_Esperantista-subscribe@yahoogroups.com>

Aliĝilo

*bv. enskribi klare kaj preslitere, por ke ne okazu miskompreno.

nomo (latinlitere) _____

*skribu vian familian nomon majuskle.

nomo (ĉinlitere) _____

*se vi estas ĉino aŭ japano

naskiĝo (tago/monato/jaro) _____ sekso _____

poŝta adreso (latinlitere) _____

poŝta adreso (ĉinlitere) _____

*se vi loĝas en Ĉinio aŭ Japanio

poŝta kodo _____ lando _____

reta adreso _____

Ne publikigu mia(j)n

[] nomon [] poŝtan adreson [] retan adreson

*Se vi ne volas, ke viaj nomo kaj adreso aperu en la nomaro, kiun ni eble faros kaj disdonos al membroj, marku krucon en la krampoj.

Mi pagas abonkotizon de n-ro _____ ĝis n-ro _____, sume
_____ USD / EUR / JPY, per la maniero (1) / (2) / (3).

*forstreku ne validajn.

Mi ne estas pagokapabla, ĉar...

Al kiu budhisma skolo (tradicio) vi apartenas?

*Vi ne nepre bezonas respondi tiun ĉi demandon

日本仏教エスペ란チスト連盟機関誌

ラ・ヤパーナ・ブッダーノ

第382号／2016年特別号

発行 eldonita de

Japania Budhana Ligo Esperantista

Sidejo / YAMAMOTO Osamu

<zelkovo@m2.cty-net.ne.jp>

Sibagaki-tyô 10-14, Ôbaneen, Komono-tyô, JP-510-1242 Japanio

TTT-paĝo / <http://www001.upp.so-net.ne.jp/jble/budhismo.html>

2016.10.05

編集 kompilita de

山口眞一 YAMAGUTI Sin'iti

校閲 provlegita de

山本修 YAMAMOTO Osamu

本号は特別号として、JBLE会員外へも広く頒布されます。

La Japania Budhana 特別号バックナンバーリスト

- 337号（2007年） Gvido al la Zena Templo Souĵi-ĵi（総持寺案内）
- 342号（2008年） Budho kaj Darmo（柴山全慶「仏と法」）
- 347号（2009年） Memorlibro pri Herezoj en Lamentado（歎異抄）
- 352号（2010年） Darmapado, aŭ Vortoj de Vereco（法句経）
- 357号（2011年） La Historieto de Japania Budhismo（日本仏教小史）
- 362号（2012年） La Admono kaj Vivo de Reĝo Aŝoko（アショカ王勅語）
- 367号（2013年） Budhismo el Tempo (1)（Tempo誌にみる仏教）
- 372号（2014年） Budhismo el Tempo (2)（同続編）
- 377号（2015年） La Sukhavativjuho（阿弥陀経）